

## Regolamento concorso letterario

Itala Esperanto-Federacio organizas literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto.

La konkurso konsistas el du branĉoj,

**poezio:** maksimuma longo ne fiksitaj;

**prozo:** (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj.

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Ne eblas partopreni per traduko de propraj verkoj, ankaŭ se la itala originalo estas eldonita.

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj tri jaroj.

La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo, al la adreso [concorso@esperanto.it](mailto:concorso@esperanto.it) indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso

Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia, indikante sur la koverto “literatura konkurso” kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n kaj la originala(j)n tradukita(j)n verko(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

**Premioj:** la gajnintoj de la unua premio de la du branĉoj ricevos akvaforton originale verkitan por la premio Zamenhof, por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj libroj. La unua premio en la branĉo “poezio” havas titolon “Gaudenzio Pisoni”; la unua premio en la branĉo prozo havas titolon “Lina Gabrielli”. La disdono de la premioj okazos dum la koncerna kongresa programero; se premiito ne ĉeestos ĝin, tiu estos kontaktata pri la livero.

**Limdato** por la sendado estas la 30-a de aprilo de la koncerna jaro.

**Juĝkomisiono:** prezidanto: Michela Lipari, sekretario: Ivan Orsini; por branĉo poezio: Giulio Cappa, Tiberio Madonna, Nicolino Rossi; por branĉo prozo: Gabriele Aquilina, Valerio Dalla, Norberto Saletti.

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por **pliaj informoj** : [concorso@esperanto.it](mailto:concorso@esperanto.it)

FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia